

Werk

Titel: Reports

Ort: Wiesbaden

Jahr: 2001

PURL: https://resolver.sub.uni-goettingen.de/purl?666048797_0005 | LOG_0017

Kontakt/Contact

[Digizeitschriften e.V.](#)
SUB Göttingen
Platz der Göttinger Sieben 1
37073 Göttingen

✉ info@digizeitschriften.de

Genetic and linguistic perspectives on the prehistory of the Yakuts

Brigitte Pakendorf

Pakendorf, Brigitte 2001. Genetic and linguistic perspectives on the prehistory of the Yakuts. *Turkic Languages* 5, 138-143.

On the basis of archaeological, ethnographic and linguistic data, the Yakuts have been hypothesized to have originated in South Siberia. However, molecular-genetic analyses show a close affinity of Yakut women with the neighbouring Tungusic-speaking Evenks, indicative of a common ancestry of the two groups. Therefore, I would like to analyse the Yakut language in order to ascertain the possibility of an Evenki substrate, which would be expected if the Yakut women had shifted from a Tungusic to the current Turkic language. In addition, I intend to perform more genetic analyses to gain further insight into the prehistory of the Yakut population.

Brigitte Pakendorf, Max Planck Institute for Evolutionary Anthropology, Inselstrasse 22, 04103 Leipzig, Germany.

The Yakuts

The Yakuts, who live in the Sakha Republic (Yakutia) in northeastern Siberia, and the Dolgans, who live on the Taimyr Peninsula, are the world's northernmost Turkic-speaking peoples. Along with the Turkic language, which distinguishes the Yakuts from their nearest neighbours (the Tungusic-speaking Evenks and Evens and the Yukagirs, who speak a so-called "Paleosiberian" language), the Yakuts stand out among the north Siberian populations by reason of their subsistence pattern, which traditionally consists of semi-nomadic cattle- and horse-breeding, as opposed to the more common patterns of reindeer herding or hunting and gathering. The Yakut language and subsistence pattern have led researchers since the 18th century to assume a southern origin of the population (e.g. Nikolaus Witsen, Johann Philipp von Strahlenberg and Jakob Lindenau, cited in Berezkin 1987).

Former habitat

The language itself contains some indications of a former habitat further to the south, for example in the words for 'March', *kulun tutar*, which literally means 'holding the foals', i.e. in order to prevent them from suckling so that the mare could be milked. In the harsh climate of Yakutia foals are not born until May, however. The Yakut language also has a word for 'camel', whereas other indigenous Siberian languages borrowed the Russian word *verbljud*, indicating that the forebears of the Yakuts were

familiar with the animal. Furthermore, the Yakut word for 'ocean, sea' is *bayyal*, implying a former habitat in the vicinity of Lake Baykal. In addition, the traditional epics and legends of the Yakuts tell of a migration from the south to the middle reaches of the Lena River.

The Kurykans

On the northwestern shores of Lake Baykal, the archaeologist Okladnikov discovered the remains of a horse and cattle breeding population, which he identified as the Kurykans (*quriqan*) mentioned in Chinese sources and appearing in the Turkic inscriptions from the Orkhon valley. These Kurykans are proposed to have lived in the area surrounding Lake Baykal during the second half of the first millennium A.D. Based on the archaeological remains and a number of rock paintings in that area as well as on the folklore and ethnographic data, Okladnikov (1955) postulated that some Kurykans migrated to the north along the Lena river after the invasion of the Mongol hordes in the 11th to 13th centuries. He assumed that some admixture with these Mongols had taken place before the migration, and that those Kurykans remaining behind had mixed completely with the invaders, thereby forming the Buryats, who still live in the areas surrounding Lake Baykal. Okladnikov further hypothesized that the groups migrating northward along the Lena displaced and mixed with the indigenous Evenks, Evens and Yukagirs, thereby forming the Yakuts.

Three questions

The main hypothesis regarding the origins of the Yakuts as postulated by Okladnikov and others (cf. Konstantinov 1975; Alekseev 1996) gives rise to three questions:

- (i) Do the Buryats and Yakuts stem from a shared ancestral population (the Kurykans)?
- (ii) To what extent did admixture with Mongols and with Tungusic populations (Evens and Evenks) take place?
- (iii) Do the Yakuts show close affinities with other Turkic-speaking groups, as indicated by their language?

Genetic analyses

In an attempt to elucidate the origins of the Yakuts and to provide answers for the above questions, I performed molecular-genetic analyses on a sample of 117 Yakuts from the Vilyuy River and 76 Buryats from Ulan-Ude. The data were then compared to all available data for other populations from Eurasia taken from the literature. These included, among others, Mongols (Kolman, Sambuugiin & Bermingham 1996), Kirghiz, Kazakh, Uyghur (Comas et al. 1998), Altay (Shields et al. 1993), Anatolian Turks (Comas et al. 1996), Evenks (Torrioni et al. 1993, Wiebe, pers. comm.) and Evens (Derenko 1997).

Currently, two parts of the human genome are most widely used for purposes of reconstructing human population histories. One is mitochondrial DNA, the other the non-recombining portion of the Y chromosome (NRPY).

Mitochondrial DNA (mtDNA) is a separate DNA molecule found in the cell's mitochondria (the cell's energy-producing centres). It is a very small, circular molecule that has several advantages for molecular anthropological studies over the "normal" nuclear (autosomal) DNA contained within chromosomes. mtDNA is present in hundreds to thousands of identical copies within each cell, which makes it very easy to obtain enough DNA for genetic analyses. The fact that all the copies within a cell (and within an individual) are identical means that there is no recombination, i.e. the genes on the mtDNA are not "reshuffled" every generation, as happens in autosomal DNA. Therefore, mutations (errors in the DNA sequence) are expected to accumulate in individual genetically related lineages, which can be followed back through time. Furthermore, one of the most important assets of mtDNA is the fact that it is passed on only in the female line. Therefore, one is able to study the genetic history of the female part of a population using mtDNA (for a review of the use of mtDNA in molecular anthropology, see Stoneking 1993).

The Y chromosome, on the other hand, is passed on only from men to their sons, thereby giving us the opportunity of studying the male part of a population's history. Interestingly, as many recent studies have shown, male and female histories can differ considerably. In addition to its solely paternal inheritance, the NRPY has the same advantage as mtDNA of not undergoing recombination, so that it is possible to determine genetically related lineages from accumulated mutations. These can then be followed back in time in order to reconstruct population histories (for a review of the use of Y chromosomal analyses in evolutionary studies, see Hammer & Zegura 1996).

Results

The results of these genetic studies (which will be published elsewhere) indicate that the Yakuts are not genetically related to Buryats, as has been postulated by other researchers (see figure for a schematic representation of the results). On the contrary, the mtDNA analyses (i.e. those analyses uncovering the female part of the population history) show that the Yakut and Evenk women stem from a common ancestral population, with the Yakuts having undergone Mongolian admixture. This last point will hardly be surprising to Turcologists, as the Yakut language is known to contain a large number of Mongol loanwords. The mtDNA analyses do not show any relationship of the Yakuts to the other Turkic-speaking populations used in the comparisons; of course, these represent only a small subset of all current Turkic populations, the choice having been restricted by availability of relevant data.

Severe reduction in number of men

The Y chromosomal analyses show very interesting results in that the Yakut men have undergone a recent and very severe reduction in population size. This population reduction could be due to either of two causes:

(i) a small group of related men migrated to the territory of what is now the Sakha Republic (Yakutia); or

(ii) the indigenous men were severely decimated, with only a small number of related men surviving.

In the first case, the immigrants would have had some attributes which led the indigenous Evenk females to mate preferentially with them. This would most plausibly be the “southern” cultural elements, such as horses, cattle, and the knowledge of iron—which are most logically linked with the Turkic language. In this case, a group of Turkic immigrants, carrying the southern cultural elements with them, would have migrated north, where they mated with the indigenous females, who replaced their Tungusic language with the Turkic one. In the second case, a strong group would have decimated the indigenous Tungusic-speaking males, leaving only a few closely related survivors. In this case, both the males and the females would have undergone language replacement—which would indicate that the dominant males were Turkic speakers, and that the replacement process was one of extreme elite dominance.


Aim of the study

It is the aim of the current study to further analyse Yakut prehistory, using both genetic and linguistic methods. I thereby hope to establish whether genetic and linguistic approaches can usefully be combined in order to elucidate population histories. One of the main questions I wish to address with the linguistic studies is whether a Tungus/Evenki substrate is detectable in the Yakut language. This question has not been studied intensively up to now (cf. Stachowski & Menz 1998)—however, since the results of the mtDNA analyses show that the Yakut and Evenk females stem from a common ancestral population, quite a strong Evenki influence might be expected in the language.

Furthermore, I intend to specifically test the competing hypotheses of (i) a recent immigration of Turkic-speaking males with “southern” culture and a strong selective mating advantage versus (ii) a violent language replacement by elite dominance of a Turkic-speaking group over indigenous Tungusic populations.

I would expect the first hypothesis, i.e. Turkic-speaking males mating with Tungusic-speaking females, with only the latter shifting their language, to result in differences in the origin of words appertaining to gender-specific domains. Therefore, an analysis of such words might clarify the process of language replacement that has taken place in the Yakut population. Genetically, the origin of the Yakut males can be elucidated using specific markers on the Y-chromosome, especially in Turkic- and Tungusic-speaking populations in addition to the Yakuts themselves.

Figure: Schematic representation of the results from the mtDNA and Y chromosome analyses.



Acknowledgements

I would like to thank Bernard Comrie and Mark Stoneking for discussion and valuable comments.

References

- Alekseev, A. N. 1996. *Drevnjaja Jakutija – neolit i epoxa bronzy*. [Ancient Yakutia: The Iron Age and the Medieval Epoch]. Novosibirsk: Izdatel'stvo Instituta Arxeologii i Étnografii SO RAN.
- Berezkin, I. G. 1987. *Po sledam našix predkov i sovremennikov*. [Following the footprints of our ancestors and contemporaries]. Jakutsk: Jakutskoe knižnoe izdatel'stvo.
- Comas, D. & Calafell, F. & Mateu, E. & Perez-Lezaun, A. & Bertranpetit, J. 1996. Geographic variation in human mitochondrial DNA control region sequence: the population history of Turkey and its relationship to the European populations. *Molecular Biology and Evolution* 13, 1067-1077.
- Comas, D. & Calafell, F. & Mateu, E. & Perez-Lezaun, A. & Bosch, E. & Martinez-Arias, R. & Clarimon, J. & Facchini, F. & Fiori, G. & Luiselli, D. & Pettener, D. & Bertranpetit, J. 1998. Trading genes along the Silk Road: mtDNA sequences and the origin of Central Asian populations. *American Journal of Human Genetics* 63, 1824-1838.

- Derenko, M. V. 1997. *Izmenčivost' mitoxondrial'noj DNK u korjakov, évenov i jakutov.* [Mitochondrial DNA variation in Koryaks, Evens and Yakuts]. [PhD thesis, Moscow.]
- Hammer, M. F. & Zegura, S. L. 1996. The role of the Y chromosome in human evolutionary studies. *Evolutionary Anthropology* 5, 116-134.
- Kolman, C. J. & Sambuugiin, N. & Bermingham, E. 1996. Mitochondrial DNA analysis of Mongolian populations and implications for the origin of New World founders. *Genetics* 142, 1321-1334.
- Konstantinov, I. V. 1975. Proisxoždenie jakutskogo naroda i ego kul'tury. [The origins of the Yakut people and their culture]. In: *Jakutija i ee sosedi v drevnosti.* [Yakutia and her neighbours in antiquity.] (Trudy Prilenskoj arxeologičeskoj ekspedicii). Jakutsk: Jakutskij filial SO AN SSSR. 106-173.
- Okladnikov, A. P. 1955. *Istorija Jakutskoj ASSR 1: Jakutija do prisoedinenija k russkomu gosudarstvu.* [The history of the Yakut ASSR. 1: Yakutia before its incorporation into the Russian state]. Moskva, Leningrad: Izdatel'stvo Akademii Nauk SSSR.
- Shields, G. F. & Schmiechen, A. M. & Frazier, B. L. & Redd, A. & Voevoda, M. I. & Reed, J. K. & Ward, R. H. 1993. mtDNA sequences suggest a recent evolutionary divergence for Beringian and northern North American populations. *American Journal of Human Genetics* 53, 549-562.
- Stachowski, M. & Menz, A. 1998. Yakut. In: Johanson, L. & Csató, É. Á. (eds.) *The Turkic languages.* (Routledge Language Family Descriptions.) London, New York: Routledge. 417-433.
- Stoneking, M. 1993. DNA and recent human evolution. *Evolutionary Anthropology* 2, 60-73.
- Torrioni, A. & Sukernik, R. I. & Schurr, T. G. & Starikovskaya, Y. B. & Cabell, M. F. & Crawford, M. H. & Comuzzie, A. G. & Wallace, D. C. 1993. mtDNA variation of aboriginal Siberians reveals distinct genetic affinities with native Americans. *American Journal of Human Genetics* 53, 591-608.
- Wiebe, V., personal communication.

Tjurklingvanoj en Bulgario dum la 1990aj

Sabira Ståhlberg

Ståhlberg, Sabira 2001. Tjurklingvanoj en Bulgario dum la 1990aj. *Turkic Languages* 5, 144-151.

Bulgaria has been inhabited by Turkic speakers for centuries, with a strong impact of Turkish immigration during the Ottoman Empire. During the Communist period (1944-1989), the minorities of Bulgaria were submitted to a minority policy that reduced their rights, erupting in the 1980s in international protests against the treatment of Turks in the country. The Turkic speakers today, Turks, Tatars and Gagauz, live mostly in rural areas that have been hit by the serious economic and social problems of the last decade. The minority rights have been partly restored, but there was not much active minority policy in Bulgaria in the 1990s.

Sabira Ståhlberg, p.k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. E-mail: sabira@mail.bg

1. Enkonduko

Dum la lasta jardeko estis relative silente en turkologiaj rondoj pri la tjurkparolantaj etnoj en Bulgario. Tio kontrastas al la internaciaj skandaloj en 1984-1985 kaj 1989, kiam miloj da turkoj devis elmigri el Bulgario aŭ fuĝi al najbara Turkio. La politikaj ŝanĝoj okazintaj en Bulgario en novembro 1989 metis punkton al la unueciga minoritata politiko de la komunisma partio kaj la de ĝi regita ŝtato. Jam fine de tiu jaro la nova registaro agnoskis la ekziston de la turka kaj aliaj tjurklingvaj minoritatoj en Bulgario. Dum la 1990aj la minoritatoj povis rehavi plurajn el la rajtoj, kiujn ili posedis antaŭ la komunisma periodo.

La konfliktoj de Balkanio, kiujn oni en internaciaj amaskomunikiloj nomas *etnaj*, ne multe koncernis la minoritatojn en Bulgario. La politika situacio en Bulgario restis dum la 1990aj sufiĉe stabila. Kvankam iuj grupoj timas etnajn konfliktojn en Bulgario, la risko en la momento estas relative malgranda. Ne ekzistas rektaj kaŭzoj por konflikto.

Ĉe la scienca flanko aperas iom post iom esploroj pri la okazaĵoj en la komunisma epoko (vidu ekzemple Stojanov 1998), kvankam multo ankoraŭ restas nebula rilate al la tiamaj politikaj decidoj kaj iliaj konsekvencoj. Pluraj arkivoj daŭre estas fermitaj al esploristoj; pluraj estis detruitaj post 1989.

Renaskiĝas malrapide ankaŭ akademia intereso al la osmana kaj tjurka heredajtoj en Bulgario. Eblas jam de jardeko fari lingvajn kaj aliajn lokajn studojn inter la tjurklingvaj etnoj. Tial iam en la futuro oni espereble povos respondi al pluraj neklaraj demandoj, interalie rilate al la uzado de la turka fare de la romaoj (ciganoj) kaj la momenta stato de la gagauza kaj tatara en Bulgario.

Tiu ĉi artikolo celas doni kurtan superrigardon pri la momenta situacio de la tjurkparolantaj etnoj en Bulgario. Ĝi nek pretendas esti kompleta, nek tre detala, sed resumo pri la kaŭzoj, procezoj kaj tendencoj, kiuj karakterizis la tjurkparolantan minoritatan situacion en Bulgario dum la 1990aj.

2. Tjurklingvaj grupoj en Bulgario

2.1. Historia fono

Pluraj tjurkparolantaj grupoj ekloĝis sur la teritorio de nuntempa Bulgario dum la lastaj du jarmiloj. La plej konata, la bulgaroj, alvenis el la Volga regiono iam antaŭ 681, kiam estis subskribita la unua packontrakto inter ili kaj Bizanco. Ili asimiliĝis surloke kun la slav-parolanta loĝantaro kaj ekuzis slavan lingvon. Ĝis la alveno de la osmanoj en 1393 pluraj tjurklingvaj popoloj, plej verŝajne el la kipĉaka kaj oĝuza grupoj, nomadis aŭ setlis en Balkanio. Iuj esploristoj asertas, ke parto (eĉ ĝis 1/3) de la hodiaŭaj balkananoj devenas de kumanoj (kipĉakoj), peĉenegoj kaj aliaj tjurkoj, kiuj asimiliĝis lingve kaj kulture kun la slavaj kaj aliaj popoloj sur la Balkanoj (vidu Stojanov 1998: 23-56).

En la osmana imperio (en Bulgario ĝis 1878) la komuniklingvo estis la (osman)turka. Okazis ankaŭ enmigrado al Bulgario el Anatolio kaj aliaj partoj de la imperio fare de tjurklingvanoj. Ĉefe temas pri parolantoj de la (osman)turka kaj ĝiaj dialektoj, sed ankaŭ de la krimea tatara (en la 19a jarcento). En la provinco, kiu kovras pli-malpli hodiaŭan Bulgariion, vivis laŭ osmanaj fontoj en 1868 entute 2 582 385 kristanoj kaj 3 913 354 islamanoj. El la islamanoj verŝajne ĉirkaŭ 2 milionoj estis parolantoj de la turka (Stojanov 1998: 59).

La bulgara ŝtato fondiĝis en 1878 helpe de Rusio, post kio la osmanaj armeo kaj aministrantoj forlasis la landon. Tiam multaj tjurklingvanoj elektis elmigri al la osmana imperio, interalie pro la nova politika situacio, perfortaj agoj kontraŭ alilingvanoj kaj ali-religianoj fare de bulgaroj, kaj ekonomiaj, sociaj kaj aliaj kaŭzoj, kiel ekzemple perforta fiks-loĝigo de nomadoj. Entute oni kalkulas, ke ĉirkaŭ 500 000 turkoj (verŝajne inkluzive de aliaj tjurklingvanoj) elmigris inter 1878 kaj 1944 (Stojanov 1998: 237). Tamen, la entuta tjurklingva loĝantaro de la lando kreskis dum tiu periodo, interalie pro altaj naskonombroj, la balkanaj militoj komence de la 20a jarcento kaj pluraj ŝanĝoj de landlimoj. De 1920 ĝis hodiaŭ la kvanto de tjurkoj en Bulgario, malgraŭ elmigrado, restas ĉirkaŭ 10% de la tuta popolo (Ŝimŝir 1990: 162).

Tabelo 1: Tjurklingvanoj en Bulgario antaŭ 1944

(laŭ gepatra lingvo; inkluzivas verŝajne ankaŭ aliajn tjurklingvanojn).

Jaro	Kvanto	% de la tuta popolo
1868	800 000	ĉirkaŭ 2 mio
1880	523 099	26,1%
1900	539 656	14,4%
1920	542 904	11,3%
1934	618 268	10,2%

(Vidu Stojanov 1998: 59, 235-236. Karpat 1990: 17 kalkulas ĝis 28% de la totala loĝantaro; Crampton 1990:71 mencias 24, 8% por 1880. Ĝenerale la statistikoj el tiu ĉi kaj postaj periodoj estu konsiderataj kiel gvidaj, ne absolutaj.)

Pri aliaj tjurkparolantaj popoloj, ekzemple gagauzoj, tataroj kaj jurukoj mankas fidindaj historiaj informoj kaj statistikoj. Gagauzoj, kristanaj tjurklingvanoj (ofte menciitaj kiel turklingvanoj) vivas en tuta Balkanio kaj Moldavio; oni atribuas al ili respektive kipĉakan, karakalpakan, oguzan kaj selĝukan originojn (vidu pri detaloj Güngör & Argunşah 1993: 12-35, Zajączkowski 1966, Kowalski 1933: 1-28). Tataroj, enmigrintaj el la Krimeo, vivas en la regiono de Dobruĝa (nordorienta Bulgario) kaj estas dividitaj inter Rumanio kaj Bulgario. Aliaj etnoj, ekzemple turkparolantaj jurukoj, asimiliĝis kun najbaraj turkoj post fiks-loĝigaj kampanjoj komence de la 20a jarcento, aŭ formigris al najbaraj landoj (Kalaonski 1993: 97-102, vidu ankaŭ Hazai 1960: 505-510 kaj Gökbilgin 1957).

2.2. La komunisma periodo

La komunistoj, kiuj regis en Bulgario 1944-1989, kreis novan politikon rilate al la ne-bulgaraj etnoj, interalie difinante etnajn grupojn laŭ certaj kriterioj (vidu ĉapitron 3). El la tjurklingvaj grupoj aperas en la statistikoj de 1956 kaj 1965 nur turkoj kaj tataroj (kalkulitaj laŭ "etneco", ne plu laŭ lingvo aŭ religio), kaj de post 1965 ĝis 1992 nur turkoj, kio devus inkluzivi la majoritaton de la tjurklingvanoj en la lando. Tiu ĉi maniero prezenti statistikojn havis politikajn kialojn kaj fontis el la konstante ŝanĝiganta politika sinteno al minoritatoj en Bulgario.

Tabelo 2: Tjurklingvanoj en Bulgario 1946-1990 (laŭ etneco)

Jaro	Turkoj	Tataroj
1946	675 500	
1956	656 025	5 993
1965	746 755	6 430
1980	806 260	
1985	850 000	
1990	632 682	

(Vidu Stojanov 1998: 236, Grothusen 1990.)

2.3. Tjurklingvanoj hodiaŭ

En decembro 1992 okazis la ĝis nun lasta popol-kalkulado en Bulgario.¹ Tiam entute 1 216 312 personoj en Bulgario (14,33%) ne konsideris sin bulgaroj. En tiu ĉi popol-nombrado oni agnoskis la ekziston de pluraj malgrandaj etnoj. Tial ni denove havas ciferojn por gagauzoj kaj tataroj. Oni ankaŭ kalkulis la popolon laŭ lingvo, kio en kelkaj kazoj videbligis grandajn diferencojn inter la ciferoj por etno kaj lingvo. Interalie ekzistas pli da parolantoj de la tatara ol tataroj (komparu 7 833 parolantojn

¹ En printempo 2001 okazis nova kalkulado, kies rezultoj tamen ankoraŭ ne estas publikigitaj.

kontraŭ 4 515 tataroj laŭ etneco) kaj pli da turk-parolantoj (813 639) ol turkoj (800 052). Tiuj ĉi diferencoj vekas plurajn demandojn pri la etna respektive lingva memdifino de la homoj, kaj restas ankaŭ por esplori la demando, kiom da el la entute 313 396 (3,69% el la tuta popolo) romaoj (ciganoj) adoptis kaj uzas la turkan. Aliaj tjurklingvanoj, se plu ekzistas sur la teritorio de Bulgario, ne estas reflektataj en la statistikoj.

Tabelo 3: Tjurklingvanoj en Bulgario decembre 1992

Nomo	Kvanto laŭ etno	% el la tuta popolo	Kvanto laŭ lingvo	% el la tuta popolo
Turkoj	800 052	9,42%	813 639	9,58%
Tataroj	4 515	0,05%	7 833	0,09%
Gagauzoj	1 478	0,01%	402	0,00%

(Vidu SY 1993: 53, Stojanov 1998: 241.)

3. La politika situacio

3.1. Historia fono

La osmana imperio dividis la popolojn en du grupojn: islamanoj kaj ne-islamanoj. La bulgara ŝtato difinis la homojn ankaŭ laŭlingve. Sed nur kun la komunisma ideologio rilate al “naciaj minoritatoj”, kies kriteriojn difinis Stalin jam en 1913, estis kreita konscia politiko rilate al la diversaj popolgrupoj. Tiel en Bulgario post 1944 aplikigis klasifiko de homoj en etnoj laŭ certaj komunaj trajtoj, kiuj estis difinitaj de la ŝtato. Tio donis eblecon al la regantoj fiksi la “identecon” kaj la minoritatan statuson de la ne-bulgaroj, kaj direkton de la politiko aplikota al minoritatoj.

Por la unua fojo aperas nun statistikoj, kiuj reflektas okcident-eŭropajn naciismajn ideojn de la 19a jarcento kaj sovetiajn praktikojn rilate al minoritatoj. Ne necesas diri, ke tiuj ideoj kaj ilia aplikado perfortis la realecon sur la Balkanoj. La difino de etna aparteno estas tre komplika procezo. Dum jarcentoj la identeco de la homoj estis difinita laŭ la menciita osmana *millet*-sistemo bazita sur religio. Malfacilis de nulo krei konscion pri etna aparteno kaj des pli pri lingva aparteno.

Multaj homoj estis denaske plurlingvaj, kaj ne povis difini sian “etnan” lingvon, des malpli laŭ la dezirata formulo “unu etno – unu lingvo”. Etna identeco ĝis hodiaŭ estas komplika temo por multaj homoj sur la Balkanoj. La procezoj okazis – kaj okazas – kun multaj doloraj konsekvencoj, kiujn ni daŭre spertas.

Detala esploro pri la minoritata politiko dum la komunisma periodo kaj ĝiaj konsekvencoj eksplodigis la limojn de tiu ĉi artikolo; tendence tamen eblas diri, ke la politiko pendolis inter subteno kaj kuraĝigo unuflanke, kaj subpremo kaj detruo aliflanke. Al la evoluo kontribuis forte la fakto, ke Turkio fariĝis membro de NATO (1952) kaj Bulgario de la Varsovia Pakto (1955); do rolis internaciaj kaj strategiaj interesoj, la (minoritata) politiko de Sovetio kaj ĝia evoluo, la interna evoluo de la

bulgara komunisma partio, la politikaj eventoj de la tempo, kaj krome, demografiaj konsideroj de la bulgara ŝtato, kiun timigis la rapida kresko de la turka loĝantaro.

3.2. La minoritata politiko en praktiko

La minoritatoj de Bulgario havis en 1944 plurajn rajtojn, kiuj siatempe estis inter la plej liberalaj de Eŭropo. Tiuj rajtoj po-grade dum la komunisma periodo estis forprenitaj, cele al konformigo de la popolo en la lando. Tio esprimiĝis interalie en asimiligo unue de la pli etaj minoritatoj, interalie la islamaj, bulgarlingvaj pomakoj en la Rodopa montaro, poste romaoj (ciganoj) kaj laste grandskale, en 1984-1985, de turkoj. La deviga ŝanĝado de la turkaj-arabaj personaj nomoj al bulgaraj en tiuj jaroj vekis grandan interman kaj internacian proteston, parte pro agado de Turkio, kiu atente sekvis la situacion de la turka minoritato en Bulgario.

Alia granda protesto okazis en 1989 dum la tiel nomata "Granda Ekskurso", kiam centoj da miloj da homoj estis senditaj al la turka landlimo por forlasi Bulgariion (vidu Stojanov 1998: 94-214; Karpat 1990: 1-22, Mishkova 1998:5-8, Eminov 1990: 203-222). Ankaŭ laŭ iniciatoj de Turkio okazis elmigrigo de turkoj. Pintaj jaroj de elmigroj estis 1950-1951, kiam ĉirkaŭ 150 000 homoj forlasis la landon, la 1970aj (ĉirkaŭ 120 000), kaj la 1980aj (200 000-300 000). Post la falo de la komunisma reĝimo ĝis 1993 entute 140 000 homoj elmigris al Turkio (Stojanov 1998: 239). Tiu ĉi lasta elmigra ondo verŝajne estis reago al la ŝanĝita politika kaj ekonomia situacio en Bulgario. Kun la politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo kaj internacia izolado de Bulgario pro la eventoj en 1989, la minoritata politiko de la ŝtato ankaŭ ŝanĝiĝis. Antaŭ la jarfino 1989 la unua registaro post la komunisma periodo anoncis redonon de rajtoj al la minoritatoj, interalie permeson por repreno de la turkaj-arabaj personaj nomoj, kiuj estis malpermesitaj en 1984-1985. La problemoj pri la nomoj daŭris ankoraŭ dum 1990.

En 1990 fondiĝis Movado por rajtoj kaj liberecoj, kiu daŭrigis la laboron de la antaŭe malpermesita Turka naci-liberiga movado en Bulgario. Tiu ĉi partio, kiu prezentiĝis kiel radikala reprezentanto de ĉiuj islamaj minoritatoj, ludis gravan rolon en la lando komence de la 1990aj, ekvilibrante inter la grandaj partioj. Ĝia influo sur nacia nivelo iom malkreskis fine de la jardeko pro perdo de subteno inter la voĉdonantoj (vidu Stojanov 1998: 215-228, Mishkova 1998: 8-9). Ĝi tamen sur loka nivelo ludas gravan rolon en la majoritate turkaj regionoj.

Dum la 1990aj la politika situacio de la tjurklingvanoj en Bulgario restis stabila. Subpremo flanke de la ŝtato al la minoritatoj ne ekzistas de 1989, sed ankaŭ ne estis rektaj kuraĝigoj al la (re)vivigo de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Okazis tre malmulte da aktiva minoritata politiko en Bulgario en tiu ĉi jardeko. Tre pezis la ekonomiaj kaj sociaj problemoj en la majoritate turkaj regionoj, kio kaŭzis konstantan elfluon de baza laborforto al Turkio. Samtempe okazis ankaŭ parta reenmigro el Turkio.

4. Socia, ekonomia kaj lingva situacio

4.1. Ekonomia kaj socia situacio

Pluraj ekonomiaj faktoroj, interalie kolapso de iuj branĉoj post 1989, kontribuas al malfacila vivtena situacio inter tjurklingvanoj en Bulgario. La regionoj, en kiuj ili vivas, estas plejparte agrikulturaj: 68% el la turkoj, 55% el la tataroj kaj 30% el la gagauzoj vivas en la provinco. Inter la bulgaroj nur 28% vivas en la provinco (SY 1993: 53). La ŝanĝoj post 1989 kaŭzis interalie disfalon de la prezosistemo por agrikulturaj produktoj kaj de la merkatoj interna kaj ekstera. La senlaboreco kaj ekonomiaj problemoj kreskis en Bulgario dum la 1990aj kaj tio devigis multajn homojn, ankaŭ bulgariojn, elmigri por trovi pli bonajn viv- kaj laborkondiĉojn.

Tjurklingvanoj ĉefe elmigris kaj plu elmigras al Turkio pro la lingvo kaj la jam ekzistantaj ligoj (vidu Mishkova 1998: 9-15). Inter tjurklingvanoj en Bulgario la socia mobileco estas relative malgranda. Precipe tio validas por virinoj, kiuj ofte ne forlasas la hejmlinion, dum viroj povas moviĝi pro laboro de urbo al urbo, sed malofte eblas por ili moviĝi inter sociaj tavoloj. Tjurklingvanoj tendencas al socia tradiciemo kaj konservemo, kio esence ne ŝanĝiĝis dum la lasta jarcento. Ankaŭ la klereco kaj socia statuso de la tjurklingvanoj restas pli malaltaj kompare al la averaĝo por la bulgara socio. La tjurklingvaj intelektuloj plejparte elmigris al Turkio, kaj tiel mankas en Bulgario aktiva socia tavolo, kiu interesiĝus pri altigo de la ĝenerala klereco kaj socia bonfarto de siaj samlingvanoj.

La ŝanĝoj dum la 1990aj alportis ankaŭ liberecon de religia praktikado. Pluraj moskeoj estis re- aŭ nove konstruitaj, sed ankaŭ ĉi tie mankas kleruloj. Islamismaj asocioj el Turkio agadas plurloke en Bulgario, kaj estas videbla fortigo de islamo aŭ reenkonduko de tradicioj perceptataj kiel islamaj en iuj regionoj.

4.2. Lingvo kaj edukado

La ĝenerala situacio de la tjurklingvanoj en Bulgario (escepte de la nomadoj, kiujn oni fiksloĝigis) post 1878 restis tre simila al la antaŭa tempo. La tjurklingvanoj, precipe turkoj, estis majoritate kamparanoj kun malalta klereco, vivantaj en vilaĝoj. Ekzemple en 1905 nur 6% de la turkoj estis lego- kaj skribokapablaj, kaj ĝis la fino de 1934 nur 9,4% de la turkaj virinoj kaj 19,4% de la turkaj viroj sciis legi kaj skribi (Stojanov 1998: 70-71).

Sur ŝtata nivelo la bulgara fariĝis oficiala lingvo en 1878 kaj la uzo de la (osman)turka cedis en la administrado kaj iom post iom en la interpopola komunikado al la bulgara. Tamen, la turka restis plu uzata en pluraj kampoj. Ekzistis turkaj lernejoj, universitatoj kaj islamaj altlernejoj, kaj turkoj reprezentigis en la bulgara parlamento. Aperis ankaŭ revuoj, gazetoj kaj aliaj publikigaĵoj en la turka. Turkoj kontribuis al la publika vivo same kiel bulgaroj kaj aliaj grupoj en la socio, kaj ili havis inter 1878 kaj 1944 pozicion kaj civilajn kaj komunumajn rajtojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ impresas tre moderne kaj libérale

Daŭre en la komenco de la komunisma periodo ĝis la 1960aj ekzistis kaj estis ŝtate subvenciataj turklingvaj lernejoj en Bulgario. Ekzemple en 1948 jam 80% el la

turkaj infanoj iris al lernejo. Krom tio ekzistis vigla turklingva gazetaro, religiaj altlernejoj, asocioj kaj aliaj sociaj kaj kulturaj agadoj sub ŝtata gvido kaj kun ŝtata subteno. Tio ŝanĝiĝis kun la evoluo de la minoritata politiko, kaj fine ankaŭ la turka estis malpermesita kiel studfako en lernejoj (vidu Stojanov 1998: 68-69, Crampton 1990: 68-70).

La politikaj ŝanĝoj en 1989 kaj poste iom revivigis la uzadon de la turka en Bulgario. La turka lingvo de Turkio (ĉar konsiderata pli prestiĝa kaj korekta ol la lokaj dialektoj) fariĝis elektebla fako en lernejoj de majoritate turklingvaj regionoj. Eldoniĝas revuoj, gazetoj kaj libroj en la turka, kaj fondiĝis turkaj kulturaj kaj soci-celaj asocioj. Aliaj tjurkaj lingvoj en Bulgario ne havas kompareblan aktivecon, sed la parolantoj partoprenas ofte en la turka kultura kaj asocia vivo. Post ratifiko de la kadra konvencio pri minoritataj rajtoj de la Konsilio de Eŭropo (ekvalido 01.09.1999) ekde oktobro 2000 ankaŭ en la bulgara nacia televido estas elsendataj novaĵoj en la turka. Plej forte tamen influas nuntempe kaj la lingvon, kaj la pensadon de la tjurklingvanoj televido, libroj kaj gazetaro el Turkio, kiuj estas libere haveblaj kaj konsumeblaj.

5. Konkludo

Post 1990 eblas denove libere esplori pri minoritatoj en Bulgario. Pri la momenta situacio de la tjurkaj lingvoj ekzistas pluraj esplorindaj kaj neesploritaj temoj kadre de turkologio kaj ankaŭ balkanistiko. Ne nur en la procezoj de kultura, politika kaj lingva (re)naskiĝoj troveblas multo esplorinda, sed ankaŭ en la difino de la momentaj grupoj de parolantoj, lingvaj limoj, dialektoj, la stato, statuso kaj uzado de la lingvoj, la ŝanĝoj okazantaj inter parolantoj de diversaj tjurkaj lingvoj sub la amasa influo de la turka de Turkio ktp.

Soci-, etno- kaj aliaj lingvistikaj kampoj estas preskaŭ neplugitaj, kiam temas pri la tjurklingvanoj en Bulgario. Apartan atenton meritas la turka lingvo mem (en pluraj punktoj malsama al la turka de Turkio; ĝi interalie konservas multajn trajtojn el la osmana turka), kiu eble riskas drastajn ŝanĝojn aŭ eĉ malaperon sub la influo de la turka de Turkio dum la venontaj jardekoj, kaj la tatara kaj la gagauza, kiuj jam estas malaperantaj en Bulgario sub la premo de la turka kaj bulgara. Esplorindas ankaŭ la tjurkaj lingvoj en la historio, interalie la influo de la kipĉakaj kaj oguzaj lingvoj sur la netjurkaj balkanaj lingvoj (vidu Boev 1968) kaj la statuso de la osmana turka kaj ĝia influo sur la netjurkaj lingvoj kaj inverse en Balkanio (vidu Grannes 1990: 223-239 kaj 1996).

Esperable la futuro portos ankaŭ intereson al la diversaj balkanaj demandoj en pli granda perspektivo. La 1990aj montris, ke sur la Balkanoj la defioj por esploristoj kreskas, ĉefe pro la politika kaj socia realecoj, kiuj urĝigas al ne nur sciencaj, sed ankaŭ politikaj respondoj al pluraj demandoj pri interalie etneco, lingva aparteno kaj lingva klasifikado. Tie ĉi la sciencisto devos konsideri ne nur la sciencan dimension, sed ankaŭ la politikan.

Literaturo

- Boev, Emil 1968. Za bälgaro-tjurkskite ezikovi vräzki. *Izvestija na Instituta po bälgarski ezik* 17, 177-183.
- Crampton, R. J. 1990. The Turks in Bulgaria 1878-1944. En: *Karpat* 1990, 43-78.
- Eminov, Äli 1990: There are no Turks in Bulgaria. En: *Karpat* 1990, 203-222.
- Güngör, Harun & Argunşah, Mustafa 1993. *Dünden bugüne: Gagauzlar*. Ankara: Elektronik iletişim ajansı yayınları.
- Grannes, Alf 1990. Turkish influence on Bulgarian. En: *Karpat* 1990, 223-239.
- Grannes, Alf 1996. *Turco-bulgarica. Articles in English and French concerning Turkish influence on Bulgarian*. (Turcologica 30.) Wiesbaden: Harrassowitz.
- Grothusen, Klaus-Detlev (red.) 1990. *Südosteuropa-Handbuch 6. Bulgarien*. Göttingen: Vandenhoeck & Ruprecht.
- Gökbilgin, M. T. 1957. *Rumeli'de Yürükler, Tatarlar ve Evlâd-i Fatihan*. İstanbul.
- Hazai, G. 1960. Prinos kām väprosa za klasifikacijata na balkanskite turski govori. En: *Ezikovedski i etnografski izsledovania v čest na Akademija St. Romanski*. Sofija. 223-239.
- Kalaonski, Aleksej 1993. Jurucite i etničeskoto samoopredelenie na turskoto naselenie v Devinsko (Borino i Gjovren). En: Marušieva, Elena et al. *Etničeskata kartina na Bäl-garija*. Sofija: Klub.
- Karpat, Kemal H. (ed.) 1990. *The Turks of Bulgaria: the history, culture and political fate of a minority*. İstanbul: The Isis Press.
- Kowalski, Tadeusz 1933. *Les Turcs et la langue turque de la Bulgarie du Nord-Est*. Kraków: Polska Akademia Umiejętności.
- Mishkova, Diana 1998. *The Turkish minority in Bulgaria: solution to an ethnic conflict?* (Working Papers 40.) Uppsala: Department for East European Studies.
- SY = *Statistical Yearbook*. Sofia: National Statistics Bureau. 1993.
- Stojanov, Valeri 1998. *Turskoto naselenie v Bäl-garija meždu poljusite na etničeskata politika*. Sofija: LIK.
- Şimşir, Bilâl N. 1988. *The Turks of Bulgaria (1878-1985)*. London: K. Rustam & Brother.
- Şimşir, Bilâl N. 1990: Turkish minority in Bulgaria. History and culture. En: *Karpat* 1990, 159-178.
- Tacemen, Ahmed 1991. *Bulgaristan Türkleri 1878-1990*. Adana: Adana Türk Ocağı.
- Zajaczkowski, Włodzimierz 1966. *Język i folklor gagauzów z Bułgarii*. Kraków: Państwowe Wydawnictwo Naukowe.